



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 117 (4/2021) ♦ 30-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org interlingvistiko.net
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Eventoj 3

Mesaĝo de UEA okaze de la tago de Unuiĝintaj Nacioj	3
12-a Tutmonda RCE-Konferenco	3
Simpozio pri Esperanto-arĥivoj	3
5-a Konferenco de UN pri Malplej Evoluintaj Landoj	4
75-a IKU-sesio en Montrealo	4
Esperanto en universitatoj	4
ILEI raportas	5
Postdiplomaj interlingvistikaj studoj	6
Lingvistiko de Esperanto kaj de la konstruitaj lingvoj	6

Ĝeneralaj novaĵoj 7

Demandaro de ILEI, ESF kaj CED	7
Eksprezidanto de UEA ricevas ŝtatan premion en Barato	7
Premio Maŭro la Torre	8
Lingvopolitika dissendolisto	9
Melodioj de <i>La Espero</i>	9
TEJO progresis ĉe UN	9
Esperanto por UN	10
Tutmondaj Voĉoj	10
Unesko-Kuriero	10

Libroj kaj artikoloj 11

<i>Planlingvoj: De koncepto al realo</i>	11
“Kiel ni povas pli profiti de anglalingva supera edukado?”	11
IKU-libro 2021	11
<i>Literatura kosmopolitismo en la angla jarcentofino: civitanoj de nenie</i>	11
“Konstruitaj lingvoj”	12
“Kial mi estas sciencisto, kiu ne fieras pri scienco”	12
“Lingvo sen nacio”	12
“Naciigita kosmopolitismo kun komunismaj karakterizaĵoj: la superviva strategio de la Esperanto-movado en Bulgario post la Dua Mondmilito”	12
“Esperanto, la surprize grava lingva subkulturo de Ĉinio, malrapide formortas”	12
“Post la naciaj bataloj en la Unua Mondmilito sin proponis la eblo antaŭenigi pacon kaj interkomprenon per la arta lingvo Esperanto”	13
“Tempo kaj aspekto en Esperantaj verbaj markiloj”	13
“Futuraj participoj en la verkoj de Zamenhof”	13
“Vortoj por beroj en artefaritaj lingvoj”	13
Kontestataj lingvoj en la malnova mondo	14
“Scio kaj lingvo en la klasika barata lingvistiko: kelkaj rimarkoj”	14
“TEKA: Transnacia reto el Esperanto-parolantaj kuracistoj”	14
Indekso por <i>IPR</i> pretigita	14
“Esperanto por vigligi intereson pri la gepatra lingvo kaj pli efike lerni fremdan lingvon”	15
“Kial oni plejparte ignoris la malkovron de la ŝprucfluo? Eble ĉar oni publikigis ĝin en Esperanto”	15
“Danĝere oportuna: subpremo de Esperanto kaj la latina alfabeto en Ĉinio kaj Japanio dum la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj”	15
“Esperanto: lingvo kaj komunumo en la 21-a jarcento”	15
<i>ESF Connected: Lastatempaj blogaĵoj</i>	16

Stipendioj de ESF 17

EVENTOJ

Mesaĝo de UEA okaze de la tago de Unuiĝintaj Nacioj

<https://uea.org/gk/990>

La 24-an de oktobro 2021, ni festis 76 jarojn de Unuiĝintaj Nacioj, la plej ampleksa internacia organizo, la plej ambicia elpaŝo por internacia diplomatio kaj nuntempe la plej grava institucio por trovi kaj antaŭenigi tutmondajn solvojn por tutmondaj problemoj.

La nuntempaj defioj, ekde klimatsanĝiĝo ĝis genra malegaleco, ekde malpaco ĝis malsato, ekde deviga migrado ĝis maljusta diskriminacio, ekde KOVIM-19 ĝis malsanaj vivkondiĉoj, ekde misinformado ĝis malriĉeco, montras, ke la mondo bezonas multe pli da multflankismo kaj kunlaborado. Kaj por tio ni devas konstrui la UN-on kiun la popoloj de la mondo bezonas.

(Legu la ceteron de la mesaĝo ĉe la adreso ĉi-supre.)



12-a Tutmonda RCE-Konferenco

(virtuale) 16-a ĝis 18-a de novembro 2021

<https://www.rcenetwork.org/portal/12th-global-rce-conference-%E2%80%93-call-submissions>

La temo estos edukado por daŭripova evoluigo: “Atingi la celojn de daŭripova evoluo: agado per lernado en tempo de mondaj krizoj”. La konferencon gastigos RCE Skotlando kaj la Tutmonda RCE-Servocentro (RCE = regionaj centroj de sperto), kun subteno de la japana ministerio pri la medio.

Simpozio pri Esperanto-arĥivoj

<https://esperparadigma1.sciencescall.org/resource/page/id/28>

La 8-an de septembro, tiu simpozio en Berlino konkludis seminarion pri la historia aliro al lingvaj praktikoj en transnacia kunteksto. La programo troveblas ĉe la adreso ĉi-supre.

La simpozio okazis en la angla kaj Esperanto, sen traduko.

5-a Konferenco de UN pri Malplej Evoluintaj Landoj

Komence de 2022 okazos en Daŭho (Kataro) la Kvina Konferenco de UN pri Malplej Evoluintaj Landoj, la tiel nomata Konferenco Daŭho 5.

UEA havis okazon formale interveni en lastatempa Konsultiĝo kun Civila Socio prepare al ĉi tiu konferenco. Nia reprezentanto prof. Francis Hult atentigis pri lastatempa raporto de la Monda Banko, kiu finfine rekonis la gravecon de instruado en la denaskaj lingvoj de infanoj – principo jam delonge akceptita de Unesko kaj plejparte ne rekonata de aliaj instancoj. Temas do pri signifa paŝo antaŭen, kiu ligiĝas kun la agado de UEA subtene al instruado en la gepatra lingvo kaj kontribue al la laboro de Unesko.

Informis Humphrey Tonkin.

75-a IKU-sesio en Montrealo

[amri \(ĉe\) huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)

<https://uea.org/gk/983>

<https://uea.org/kongresoj/universitato>

Kadre de la 107-a UK en Montrealo okazos la 75-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas proponojn pri IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario (Amri Wandel ĉe la retroŝta adreso ĉi-supre) plej laste la 31-an de januaro 2022.

Esperanto en universitatoj

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>

<https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

Dum la lastaj ses monatoj la laborgrupo “Esperanto en universitatoj” de ILEI, UEA, TEJO kaj ESF okupiĝis pri la rutinaj taskoj eltrovi kaj kontakti universitatanojn-esperantistojn ne jam en kontakto kun la movado kaj subteni diversmaniere ilian agadon. Krome ĝi okazigis regulajn vidkunvenojn por antaŭenigi projektojn en ĉi tiu kampo. Dum la lastaj 6 monatoj temis pri:

- ◆ aranĝado de la simpozio dum la ILEI-kongreso pri “Esperanto en universitataj medioj – nuntempo kaj estonteco” inter esperantistaj kaj neesperantistaj universitatoj;
- ◆ trovado de rimedoj por funkciigi kurson de Esperanto en la universitato Espoir en DR Kongo;
- ◆ enketo inter universitatanoj esperantistaj kaj neesperantistaj pri la ebla rolo de Esperanto en universitataj kursoj;
- ◆ starigo de reta Universitato de Esperanto;

- ◆ aranĝado de retaj seminarioj en iranaj universitatoj kun eksterlandaj prelegantoj en Esperanto kaj de la sekvaj kursoj pri Esperanto;
- ◆ subteno al la interlingvistikaj kursoj de la universitato de Poznano.

La kompletajn registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA kaj la retejo de IrEA, ĉe la adresoj sub la titolo de ĉi tiu artikolo.

Por kontakti la laborgrupon bonvolu skribi al [esperanto.en.universitatoj \(ĉe\) gmail.com](mailto:esperanto.en.universitatoj(ĉe)gmail.com).

ILEI raportas

Kongreso 2021

Malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj, la 54-a kongreso de ILEI bone sukcesis en la formo de la retseminario VEKI-2. La 2-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI, fakte, okazis inter la 7-a kaj la 14-a de aŭgusto 2021. Ĉeestis 156 partoprenantoj el 42 landoj. Benino, kiu devintus gastigi la ĉeestan kongreson, restis en la fokuso dum la Nacia Vespere kaj dank' al la interesaj prelegoj de afrikaj profesoroj. La kongresa temo estis “Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”.

Kongreso 2022

Jam ekis la preparado por la venonta kongreso de ILEI. La 55-a kongreso okazos en Kebekurbo (Kanado). La kongreso daŭros de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2022. La temo, kiu trovis la varman subtenon de la kebekaj samideanoj, ĉar ĝi bone respegulas la lokan situacion, estos “La instruado de esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado”. Espereble per ĝi la LKK sukcesos ankaŭ varbadi neesperantistojn kaj interesigi ĵurnalistojn kaj aliajn. La temo de la simpozio povus esti la iom pli faka “Tradukado en instruado”, se evidentiĝos sufiĉe da intereso.

Kongreso 2023

La kongreso de 2023 okazos en Massa (Italio), kie troviĝas la Nacia Esperanto-Biblioteko, aparte grava por la historio de ILEI. La estro de la LKK estas Bruĉjo Casini, kiu jam trovis tre taŭgan malmultekostan kongresejon. La datoj estos de la 22-a ĝis la 29-a de julio 2023, tuj antaŭ la UK de Torino. La temo estos “Instrui Esperanton en lernejoj”. Jam funkcias aparta retejo por la kongreso. Aparte grave por ILEI estas ankaŭ, ke al la kongreso ligiĝas projekto de instruado de Esperanto en la lernejoj de la itala regiono Toskanio, nomita “30 Oraj Horoj”. Ĝi celas altigi la metalingvistikajn kapablojn de gelernantoj en italaj superaj mezlernejoj precipe por klopodi plibonigi la rezultojn en testoj pri la itala. La ebla eksperimento jam trovis intereson inter la lokaj publik-lernejaj aŭtoritatoj.

Postdiplomaj interlingvistikaj studoj

Ilona Koutny

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/raporto_sep21.html

La 8-an fojon startis en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando) la postdiplomaj interlingvistikaj studoj, kiuj dum 3 jaroj formas profesiajn esperantologojn, interlingvistojn kaj instruistojn...

La nuna grupo estas eksterordinara pro sia grandeco kaj multnacieco: 41 personoj el 21 landoj (9 ekstereŭropaj landoj: Brazilo, Ĉilio, Ĉinio, Indonezio, Irano, Koreio, Kubo, Pakistano, Vjetnamio). Legu plenan raporton ĉe la ĉi-supra adreso.

Lingvistiko de Esperanto kaj de la konstruitaj lingvoj

<http://www.masterlinguistiquetours.com>

Pri seminario “Linguistique de l’espéranto et des langues construites” de *master 2* (t.e. la kvina jaro de studado laŭ la franca universitata sistemo) okupiĝas Philippe Planchon ekde 2018. Temas pri deviga seminario kadre de la lasta jaro de la diplomo *Master de Linguistique Avancée et Description des Langues (LADL)*.

La diplomo estas apogata de la Liĝera Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270, CNRS, Université de Tours, Université d’Orléans, BnF). La seminario okazas dum la unua stud-periodo, inter septembro kaj decembro.

Instruisto: Philippe Planchon, Asocia Profesoro, Universitato de Tours (Francio), Fakultato de Literaturoj kaj Lingvoj, Departemento de la Lingvo-Sciencoj, LLL (UMR 7270).

ĜENERALAJ NOVAĴOJ

Demandaro de ILEI, ESF kaj CED

<https://esfacademic.org/eo/demandaro/>

Ni deziras akiri kiel eble plej kompletan bildon de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj. Ni do afable petas, ke vi bonvolu preni kelkajn minutojn por plenskribi nian demandaron. Oni rajtas resti anonima.

Ankaŭ interesas nin la sinteno de ne-Esperanto-parolantaj kolegoj. Bonvolu inviti kolegojn, kiuj ne komprenas Esperanton, plenskribi “nacilingvan” demandaron; oni rajtas elekti ajnan lingvon, ne necese sian denaskan.

Eksprezidanto de UEA ricevas ŝtatan premion en Barato

<https://uea.org/gk/987>

Ĉi-jare, la Premio Vidyasagar estas por la unua fojo aljuĝita al esperantisto. Tiun ĉi premion, rilatantan al la tuta verkaro de la respektivaj aljuĝitoj, la registaro de la gubernio Okcidenta Bengallando (en Barato) lanĉis en 1980 honore al la memoro de la granda klerulo, edukisto, instituci-konstruinto kaj soci-reforma pioniro Ishwar Chandra Vidyasagar (1820–1891). En 2021 ĝi estis rebaptita al Premio Vidyasagar-Dinamoyee (kunhonore al lia edzino) kaj estas nun aljuĝata de la registara fako pri supera eduko kunlabore kun la nove establita Akademio Vidyasagar.



La 26-an de septembro 2021, okaze de la 201-a naskiĝdatreveno de Vidyasagar, la esperantista lingvisto Probal Dasgupta kaj tri samtempaj premiitoj (en aliaj sociaj kaj edukaj terenoj tuŝitaj de la pioniraj strebadoj de Vidyasagar) ricevis la Premion. Tio okazis en la ejo de la Akademio Vidyasagar en Kolkato, domo, en kiu la klerulo mem loĝis en la finaj jaroj de sia vivo.

Probal Dasgupta, studinta en Sanskrita Kolegio (Kolkato), la Dekana Kolegio de Puneo kaj Novjorka Universitato, instruis lingvosciencan en la universitato de Kolkato, la dekana kolegio, la universitato de Hajderabado kaj la barata statistika instituto en Kolkato; de tiu lasta posteno li emeritiĝis en 2018. Esperanton li helpinstruis en 1978 kun David Jordan en la sanfranciska somera kursaro, kiu estis la praformo de NASK, kaj en 1988 kun Marjorie Boulton en la barlastona somera kursaro.

Liaj eldonaĵoj koncernantaj lingvistikon inkluzivas *The Otherness of English: India's Auntie Tongue Syndrome* (1993), *Explorations in Indian Sociolinguistics* (kun Jayant Lele kaj Rajendra Singh, 1995), *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics* (kun Alan Ford kaj Rajendra Singh, 2000), *Inhabiting Human Languages: The Substantivist Visualization* (2012), *Kathaar Kriyaakarma* (bengallingva: “La agadoj de la vortoj”, 1987), *Chinna Kathaay Saajaaye Tarani* (“Sur boato ornamita per vortoj rompitaĵ”, 2011), *Bhaashaar Bindubisarga* (“La cediloj kaj cirkumfleksoj de la homa lingvo”, 2012) kaj *Merur Praarthanaa: Bishuber Uttar* (“La polusoj preĝas: la ekvatoro plenumas”, 2015).

Liaj eldonaĵoj en Esperanto inkluzivas *Primico* (traduko de poemoj de Rabindranath Tagore, 1977), *Mi juna* (traduko de aŭtobiografio de Manashi Dasgupta, 1989), *Klera edzino* (traduko de romano de Upendronath Ganggopaddhae, 1994), *Dormanta hejmaro* (traduko de romano de Manashi Dasgupta, 2006) kaj *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo* (2011). Pere de Esperantaj pontotradukoj li bengaligis la kroatan infanromanon *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić (2006), la svedan teatraĵon *Nemeza* de Alfred Nobel (2014) kaj la finnan romanon *Sep fratoj* de Aleksis Kivi (2020).

Dasgupta estas honora membro de la Lingvistika Societo de Usono jam de 2004. La Barata Konsilio pri Filozofia Esplorado nomumis lin sia vizitprofesoro de la jaro por 2009. En 2012 estis aljuĝita al li la Premio Archana Chaudhuri de Bangiya Sahitya Parishad, la bengala literatura akademio. En 2006 li estis prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (por la ekzamenoj ILEI-UEA). De 2007 ĝis 2013 li estis Prezidanto de UEA. De 2016 ĝis 2022 li estas prezidanto de la Akademio de Esperanto.

ESF tutkore gratulas al Probal, kiu estas membro de nia konsilantaro.

Premio Maŭro la Torre

<https://uea.org/gk/985>

Renato Corsetti: <http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210928/704814.html>

En la retejo de ILEI: https://www.ilei.info/novajxoj/PREMIO_MAURO_LA_TORRE.php

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplorkampo en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, Profesoro Maŭro La Torre (1946–2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis profesoron La Torre honora membro de ILEI.

La esplorkampoj estas:

- ◆ Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvo-sciencaj pritraktoj
- ◆ Interkultura edukado per Esperanto
- ◆ Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- ◆ Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto

- ◆ Retaj kursoj pri Esperanto
- ◆ Evoluo de la vorttrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la 1-a de januaro 2022.

La premio konsistas el sumo de 500 eŭroj. Por pliaj informoj pri la premio bonvolu vidi la intervjuon kun Renato Corsetti en la retejo de Ĉina Radio Internacia, aŭ legu pli en la retejo de ILEI. Ambaŭ estas ĉi-supre ligitaj.

Lingvopolitika dissendolisto

<https://clpp.umbc.edu/>
<https://lists.mail.umbc.edu/mailman/listinfo/lgpolicy>

Nia kolego Francis Hult, profesoro en la Universitato de Marilando, Baltimore County (UMBC) kaj membro de la grupo, kiu prizorgas rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj nome de UEA, transprenis gvidadon de *Language Policy List*, anglalingva retroŝta servo, kiu celas fakulojn pri lingvopolitiko. Aliĝo estas senpaga ĉe la dua adreso ĉi-supre. La alia estas la retejo de la Konsorcio por Lingvaj Politiko kaj Planado de UMBC, kiu gastigas la liston.

Melodioj de *La Espero*

Timothy Boronczyk
https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2021/03/la_espero/eo

Mi laboras por kolekti kaj konservi la diversajn melodiojn de la Esperanta himno *La Espero*, krom tiu verkita de Félicien de Ménéil. Ĝis nun, mi kolektis pli ol 20 malsamajn versiojn, verkitajn de 1891 ĝis 2020. Mallonga enkonduko al mia projekto, kaj listo de la kolektitaj verkoj, aperas en *Usono Esperantisto*. Se iu havas pli da informoj aŭ aliajn ne jam kolektitajn versiojn, mi petas kontakti min ĉe [tboronczyk \(ĉe\) gmail.com](mailto:tboronczyk@gmail.com).

TEJO progresis ĉe UN

<https://esango.un.org/civilsociety/showProfileDetail.do?method=showProfileDetails&tab=1&profileCode=625156>

Post longa klopodado, TEJO ricevis Specialan Konsultan Statuson ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOK), pere de kiu ne-registaraj organizoj estas reprezentitaj ĉe UN-instancoj.

Esperanto por UN

<https://esperantoporun.org/eo/arkivoj/>

La plej lastatempaj numeroj de la *Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj* estas haveblaj en Esperanto, la angla kaj la franca de la adreso ĉi-supre.

Tutmondaj Voĉoj

<https://eo.globalvoices.org/>

Ni atentigas pri la ekzisto de ĉi tiu internacia kaj multlingva komunumo de blogantoj, ĵurnalistoj, tradukistoj, akademianoj kaj aktivistoj pri homaj rajtoj. “Ni kolektas, kontrolas kaj tradukas novaĵojn kaj rakontojn el blogoj, sendependaj komunikiloj kaj sociaj amas-komunikiloj en 167 landoj, rakontoj, kiujn vi ne povas facile trovi en la interreto.”

Unesko-Kuriero

https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000377986_epo

Legu la novan numeron de *Unesko-Kuriero* en Esperanto!

LIBROJ KAJ ARTIKOLOJ

Planlingvoj: De koncepto al realo

<http://d-nb.info/1239423241/34>

redaktis Klaus Schubert

Ĉi tiu kolekto el dek artikoloj, unue eldonitaj en 2000 kaj 2001 kiel specialaj numeroj de la revuo de la Belga Asocio pri Aplika Lingvistiko kaj poste libroforme reeldonitaj de la brusela Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, estas nun senpage elŝutebla el la reto.

La libro estas ankaŭ alŝutita al la Germana Nacia Biblioteko, tiel ke ĝi estas nun trovebla kaj elŝutebla per la internaciaj bibliotekaj katalogoj.

“Kiel ni povas pli profiti de anglalingva supera edukado?”

<https://neerlandistiek.nl/2021/10/hoe-we-meer-kunnen-halen-uit-engelstalig-onderwijs/>

<https://www.sciencedirect.com/science/article/pii/S0346251X21001937>

Prof. Marc van Oostendorp verkis interesan artikolon en la nederlanda lingvo en la reta revuo *Neerlandistiek*: “Ju pli multaj lingvoj oni havas en prelegejo, des pli granda estas la ŝanco, ke fine ĉiuj parolos la anglan. Uzi la gepatran lingvon estas pli facile, se ĉiuj parolas la anglan.”

IKU-libro 2021

<http://iku2.trovu.com/>

La libro de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazis dum la ĉi-jara Virtuala Kongreso de UEA, estas senpage havebla ĉe la ĉi-supra adreso. Kun 134 paĝoj, 14 prelegtekstoj kaj multaj ilustraĵoj ĝi estas inter la plej altkvalitaj kaj diverstemaj sciencaj tekstoj en Esperanto.

Literatura kosmopolitismo en la angla jarcentofino: civitanoj de nenie

Stefano Evangelista

<https://global.oup.com/academic/product/9780198864240>

Ĉi tiu nova libro, eldonita en julio, prezentas anglalingvan literaturon en kuntekstoj eŭropa kaj tutmonda, kun diversaj materialoj historiaj kaj arĥivaj. Ĝi proponas novan vidpunkton pri la literaturo de la fino de la 19-a jarcento.

“Konstruitaj lingvoj”

Christine Schreyer

<https://doi.org/10.1146/annurev-anthro-101819-110152>

Ĉi tiu ĝenerala enkonduko aperis en la plej lasta numero de *Annual Review of Anthropology*.

“Kial mi estas sciencisto, kiu ne fieras pri scienco”

<https://personal.us.es/vmanzano/publicaciones.htm>

IF-Sofia, brazila revuo pri filozofio, scienco kaj teĥniko lastatempe publikigis ĉi tiun artikolon en Esperanto. Haveblas samloke ankaŭ hispana traduko.

“Scienco estas kutime prezentata kiel la plej altnivela kolekto de scio, regata nur de racio kaj je la manoj de specialaj homoj, la sciencistoj, malgraŭ la ekzisto de vasta kolekto de kritikoj rilate al tiu naiva priskribo. Ĉi tiu teksto ne celas pli teorumi pri tiu kutima priskribo, nek pri tiuj kutime faritaj kritikoj, sed kunhavigi la personajn spertojn de la aŭtoroj, amasitaj dum iom da jardekoj de scienca laboro.”

“Lingvo sen nacio”

<https://www.lingoblog.dk/et-sprog-uden-land/>

<https://www.lingoblog.dk/en/a-language-without-a-nation/>

Jen bela artikolo pri Esperanto, verkita de universitatatano-esperantisto en Danlando.

“Naciigita kosmopolitismo kun komunismaj karakterizaĵoj: la superviva strategio de la Esperanto-movado en Bulgario post la Dua Mondmilito”

Ana Velitchkova

<https://www.academia.edu/49575204/>

“La kazo de la bulgara Esperanto-movado sub ŝtata socialismo montras, ke socia movado povas travivi sub aŭtoritatismo, se ĝi establas laŭleĝan aktivistan kulturon akcepteblan al la reĝimo, dum ĝi direktas sin al siaj propraj esencaj celoj.”

“Esperanto, la surprize grava lingva subkulturo de Ĉinio, malrapide formortas”

<https://radiichina.com/esperanto-subculture/>

Jen artikolo eldonita en junio pri la historio kaj estonteco de Esperanto en Ĉinio.

“Post la naciaj bataloj en la Unua Mondmilito sin proponis la eblo antaŭenigi pacon kaj interkomprenon per la arta lingvo Esperanto”

Florian Coulmas

<https://www.nzz.ch/feuilleton/ld.1632650>
https://eo.wikipedia.org/wiki/Florian_Coulmas

Lu Wunsch-Rolshoven informas nin, ke la gazeto *Neue Zürcher Zeitung* publikigis artikolon en la germana pri la klopodoj de (interalie) Nitobe Inazō ĉe la Ligo de Popoloj ĉirkaŭ 1923. La artikolon aŭtoris Florian Coulmas, japanologo kaj socilingvisto, kiu verkis ankaŭ *Guardians of Language: Twenty voices through history*, baldaŭ aperonta en Esperanta traduko.

“Tempo kaj aspekto en Esperantaj verbaj markiloj”

http://memoires.scd.univ-tours.fr/index.php?fichier=Linguistique/Master2/2019LING_M2_Cotinet_Agathe.pdf

En 2019 studentino Agathe Cotinet faris sian findiploman studlaboraĵon pri tempo kaj aspekto en Esperanto sub la gvido de Philippe Planchon, Asocia Profesoro, Universitato de Tours (Francio). Ŝi faris tre interesan laboraĵon por pritrakti tiun temon: ŝia verko ampleksas ĉ. 160 paĝojn). La defendo estis tre sukcesa, tiel ke la ekzamenantaro decidis ke ŝia laboraĵo estu alirebla por legantoj. Do ĝi estas libere elŝutebla (en la franca lingvo) ĉe la retpaĝoj de la Universitata Biblioteko de Tours.

“Futuraj participoj en la verkoj de Zamenhof”

Natalia Dankova

<http://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2021/05/6-Dankova.-Future-participles-in-the-writings-of-Zamenhof.pdf>

Nun elŝuteblas ĉi tiu artikolo origine eldonita en numero 7 (2015) de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*.

“Vortoj por beroj en artefaritaj lingvoj”

Alan Reed Libert

<https://www.academia.edu/53692145/>

Tiu ĉi mallonga artikolo esploras la manierojn, laŭ kiuj diversaspecaj planlingvoj nomas berojn.

Kontestataj lingvoj en la malnova mondo

<https://webcolleges.uva.nl/Mediasite/Play/f44c2ae7a923447d8373e54f5ea542021d>

Herman Dekeunink sendis informon pri enreta filmo de prelegoj en la konferenco CLOW3 (Contested Languages in the Old World) en Amsterdamo en majo 2018. Je 1h48 en la filmo Sabine Fiedler klarigas kiel Esperanto estas tia lingvo.

Rilatas la libro *Kontestataj lingvoj: la kaŝita plurlingveco de Eŭropo*, pri kiu ni raportis en *IPI* 114 (p. 17–18).

“Scio kaj lingvo en la klasika barata lingvistiko: kelkaj rimarkoj”

Probal Dasgupta

<https://probaleo.wordpress.com/tag/article/>

La aŭtoro lastatempe afiŝis ĉi tiun artikolon, kiun li verkis por la libro *Forms of Knowledge in India: Critical Revaluations* (Delhio, 2008, red. Raval, Mehta, Yashaschandra).

“TEKA: Transnacia reto el Esperanto-parolantaj kuracistoj”

Marcel Koschek

https://hunghist.org/images/Koschek_doi.pdf

Ĉi tiu artikolo pri la historio de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio aperis en lastatempa numero de *Hungarian Historical Review*.

Indekso por *IPR* pretigita

https://www.ilei.info/ipr/malnovaj_numeroj.htm

La oficiala organo de ILEI, *Internacia Pedagogia Revuo*, jam de ĉirkaŭ tridek jaroj eldonas kvinjarajn indeksojn pri la revua enhavo. Nun ĝi pretigis 15-jaran resumon.

Ekde la numero 2004/4 ĝis la numero 2020/4 en la arĥivo oni povas trovi la PDF-versiojn de *IPR*. En la kazo de la jaroj 1995 ĝis 2004 oni povas aŭ legi parton de la artikoloj, aŭ trovi la enhavtabelon ĉe la adreso ĉi-supre.

“Esperanto por vigligi intereson pri la gepatra lingvo kaj pli efike lerni fremdan lingvon”

<http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210922/703547.html>

Interesa intervjuo kun Elisabetta Vilisics Formaggio aperis en la retejo de Ĉina Radio Internacia.

“Kial oni plejparte ignoris la malkovron de la ŝprucfluo? Eble ĉar oni publikigis ĝin en Esperanto”

<https://www.airspacemag.com/as-next/as-next-may-unbelievablebuttrue-180968355/>

Se japana meteorologo Wasaburo Ooishi ne estus esperantisto, usonaj sciencistoj en la Dua Mondmilito eble pli konscius pri nacia risko. Informis nin pri la artikolo Ilona Koutny.

“Dangere oportuna: subpremo de Esperanto kaj la latina alfabeto en Ĉinio kaj Japanio dum la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj”

Joseph Essertier

https://nitech.repo.nii.ac.jp/?action=repository_action_common_download&item_id=6767&item_no=1&attribute_id=12&file_no=1

“Ĉi tiu referaĵo traktas baze la temon de lingva rajtoj, specife la rajtoj de homoj en Ĉinio kaj Japanio aliri informojn kaj povi partopreni en la socio pere de plena legkapablo. Kleruloj nur ĵus komencis verki la historiojn de la Esperanto-movado kaj la movado por uzi la roman alfabeton kiel alternativan skribsistemon en Ĉinio kaj Japanio, kaj oni kutime ne diskutas tiujn du historiojn kune.”

“Esperanto: lingvo kaj komunumo en la 21-a jarcento”

Jorge David Brasal Arevalillo

<https://edukado.net/biblioteko/diplomlaborajhoj?iid=350>

Jen nove reviziita antropologia esplorado pri la Esperanta komunumo kaj la opinio de aliaj homoj pri tio, kio estas Esperanto.

Oni komencas en la Esperanta historio kaj lingvistiko. Poste oni analizas la antaŭjuĝojn, kiujn junuloj havas pri Esperanto; kial ili eklernas ĝin kaj kial iuj forlasas ĝin; kia estas la komunuma profilo de esperantisto; kaj kiel la interreto kaj la pandemio influis al la Esperanta komunumo.

ESF Connected: Lastatempaj blogaĵoj

<https://esfconnected.org/past-posts/>

- ◆ “Interlingvistikaj Studoj UAM, Poznano (Pollando)” • Ilona Koutny (9-a de julio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/07/09/>
- ◆ “ESF ~ Jarneze” / “ESF ~ mid-year” • Chuck Mays (19-a de julio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/07/19/>
- ◆ “Giuseppe Peano kaj ‘Latino sine Flexione’” / “Giuseppe Peano and ‘Latino sine Flexione’” • Basak Aray (30-a de julio 2021) • <https://esfconnected.org/2021/07/30/>
- ◆ “PLPLE21: Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibio: Realaj kaj Bezonaj” / “PLPLE21: Workshop on Language Policy, Language Planning and Assessment in Mesoamerica and the Caribbean: Realities and Requirements” • Jorge Antonio Leoni de León (9-a de aŭgusto 2021) • <https://esfconnected.org/2021/08/09/>
- ◆ “Montrealo: la ĉefurbo de Esperantujo en 2022!” / “Montreal: Esperanto’s capital in 2022!” • Yevgeniya Amis (20-a de septembro 2021) • <https://esfconnected.org/2021/09/20/>
- ◆ *Planlingvaj ekskursoj 4: “Diri multon per malmulto” / Conlang Excursions 4: “Saying a Lot with a Little”* • Simon Davies (4-a de oktobro 2021) • <https://esfconnected.org/2021/10/04/>
- ◆ “Brian Kaneen: Grava Donacinto al Esperantic Studies Foundation” / “Brian Kaneen: A Major Donor of the Esperantic Studies Foundation” • Wally du Temple (19-a de oktobro 2021) • <https://esfconnected.org/2021/10/19/>

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kaj Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al Angela Tellier ĉe ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 31-a de decembro 2021. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: www.esperantic.org, esfacademic.org, esfconnected.org, interlingvistiko.net, www.facebook.com/esperantic. Tvitero: [@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf), [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic).

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>